FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

Nº 64a (nova serio) - Nº I49a SOMERO I984

REDAKTAS : Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE

Eldonita, ekspedita de :

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. Nº 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo = 20Fr. Subtena = ek de 30 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno, sen membreco = 20 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

## SOMERAJN BONDEZIROJN !

En tiu speciala Bulteno-cirkulero, bonvolu trovi, preskaŭ ekskluzive, informojn pri la Ĝenerala Kunveno de U.N.E.
Ĝi okazos en BAYEUX, la 6an kaj la 7an de Oktobro I984 .
Ni insiste petas ke vi senprokraste sendu vian aliĝilon al la organizantoj !

Ni skribas " preskaŭ ekskluzive " ... ĉar ni aldonis informilon - aliĝilon por la Franc - Germana Semajno, organizata de la franca kaj de la germana esperantaj junularaj organizoj . Kial ? Tute simple pro tio ke, ĉi jare , tiu " Semajno " de la I2a ĝis la I9a de Aŭgusto okazos en provinco Normandio, pli precize en LE HAVRE .

La kutimajn rubrikojn vi povos legi en la Nº I50 aperonta post la feria tempo, dum Septembro , kun : Vivo de la Grupoj - Organizado de bicikla rondiro tra Normandio - Protokoloj pri diversaj manifestacioj okazintaj en nia provinco - Salutojn de Normandoj vivantaj ekster Normandio.

Ĝis tiam , ni bondeziras ripozigajn feriojn al ĉiu, kun kontaktoj kun eksterlandanoj, komprenble !

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais
Le Gérant : Pierre LEMARCHAND - Dépôt Légal 2 ème trimestre I984

# B A Y E U X

Ĉefurbo de la Bessin-a regiono, kie okazos, la 6an kaj 7an de Oktobro 84

La ĜENERALA KUNVENO de U.N.E.

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

## L A  R E G I O N O

Tiu parto de " Malalta Normandio " ege verdiĝanta, sin dediĉas precipe al la bovina bredado. Ĝi vastiĝas de la " Manika Maro " ĝis la unuaj spronoj de la Normanda Bosko .

Ek de Bayeux, oni povas multe ekskursi tra la tuta regiono . I) al la marbordo, kiu situas je I5 km, ĉe la plaĝoj kie ekzistas : a) la ruinoj de fortikaĵoj starigitaj dum la pasinta milito, interalie - Arromanches kaj ĝia artaĵa haveno

- La Pointe du Hoc, kies klifoj estis konkeritaj per eskaloj kaj graploj .

b) la militaj tombejoj :
- Usona, en Colleville sur Mer ( 9 400 tomboj )
- Germana en La Cambe ( 2I 400 tomboj )
- Brita apud Bayeux ( 4 000 tomboj )

2) interne, dank'al turismaj rondiroj, interalie :

- La genista vojo (la route des genêts)
- La granita vojo (la route du granit)
- La muelejoj-vojo (la route des moulins)

## P R I  H I S T O R I O  D E  B A Y E U X

Kelkaj datoj : - Post invado kaj okupado de la Keltoj (500/300 A.K.), post la gaŭlo-romana civilizacio, post la rabado de la Saksoj ( IIIa jarcento ), Bayeux iĝis skandinavia urbo , fare de la okupado de Rollon kaj liaj Normandoj .

- Ek de la XIa jarcento, intensa religia vivo estiĝis kun St.Vigor .

- Okupata de la Angloj, dum la centjara milito , Bayeux estis liberigita en la jaro I450a, post la batalo de Formigny ( fino de tiu milito) , je I5 km okcidente de Bayeux .

- Dum la milito I939/I945 , Bayeux suferis nenian detruon, kaj iĝis la unua urbo liberigita, la 7an de Junio I944 .

## L A  U R B O  B A Y E U X

Dum la semajno, la stratoj estas sufiĉe homplenaj, precipe ŝabate, ĉar granda vendejo sin tenas Placo St.Patrice .
Dum la somera sezono, Bayeux estas vizitata de multaj eksterlandanoj, pro ĝiaj vidindaĵoj :

- La katedralo Nia Sinjorino (XI ĝis XVa jarcento)
- La Brod-tapiŝo ( 70 metrojn longa) de la reĝino Mathilde, edzino de Vilhelmo la Konkeranto .
- La muzeo Baron-Gérard, kun ĝiaj fajencaĵoj kaj porcelenaĵoj, ĝiaj puntaĵoj ...
- La malnovaj historiaj domoj ( nomataj hoteloj ) XVa / XVIa jarcento .

# Ĝ E N E R A L A   K U N V E N O   D E   U N E

6 / 7  OKTOBRO  I984

Kunvenejo : CENTRE D'ACCUEIL MUNICIPAL DE BAYEUX
Chemin du Bois de Boulogne I4400 BAYEUX

## P R O V I Z O R A   P R O G R A M O

**SABATE la 6an de Oktobro**


- Ek de la IIa, akcepto partoprenantoj
- I2.30 Tagmanĝo
I4.30 Vizito Brodtapiŝo kaj urbo
- I9.30 Vespermanĝo
- 2I.00 Distra Vespero

**DIMANĈE la 7an de Oktobro**

- 8.30 ĝis 9.30 : matenmanĝo
- I0.00 Ĝenerala Kunveno
- I2.30 Tagmanĝo
- I4.30 Vizito de la Brodtapiŝo por tiuj kiuj ne povis veni sabate
- Disiĝo

Cele al vizito de ĉiuj vidindaĵoj en Bayeux, ni konsilas al vi atingi la kunvenejon sabate la 6an de Oktobro antaŭ la tagmanĝo, aŭ komence de la post-tagmezo. Tamen oni rendevuos en urboloko al la partoprenantoj kiuj ne povos alveni sufiĉe frue .

La " Centre d'Accueil" povas gastigi 60 personojn. Ĉiu ĉambro havas lavokonkon kaj unu liton por unu persono (kun litotukoj kaj kovriloj) Kompreneble, oni devas alporti tualettukojn. Se la lokoj ne sufiĉas por loĝi la tuton de la partoprenantoj,ekzistas ankoraŭ en Bayeux alia Centro kiu povas gastigi 30 personojn. La ĉambroj entenas 3 aŭ 4 litojn .



# B U L L E T I N   D'A D H E S I O N

ASSEMBLEE GENERALE DE U. N. E.

Samedi 6 et Dimanche 7 Octobre I984

CENTRE D'ACCUEIL MUNICIPAL DE BAYEUX
Chemin du Bois de Boulogne I4400 BAYEUX

Mr./Mme/Mlle (I) NOM                                        Prénom

Adresse complète

Accompagné de M.

J'arriverai au Centre le Samedi (I) / Dimanche (I) vers H.

| | (I) | | Nbre | Prix | Totaux |
|---|---|---|---|---|---|
| Cotisation d'adhésion | | | | 25F x | |
| Je déjeunerai au Centre le Samedi midi | oui | non | | 30F x | |
| Je participerai à la visite de la Tapisserie et de la Ville | oui | non | | IIF x | |
| Je dinerai le samedi soir au Centre, participerai à la soirée(2) récréative, y coucherai et y prendrai le petit déjeuner | oui | non | | 80F x | |
| Je déjeunerai le dimanche midi au Centre | oui | non | | 30F x | - |
| | | | | Total | |

Je joins à ce bulletin d'adhésion un chèque de 25F par personne inscrite. Cette somme sera déduite du montant à payer à mon arrivée, ou sera restituée en cas d'annulation à condition que j'en avise M.ANGENAULT avant le 25 Août I984 . Le chèque bancaire ou postal est à libeller au nom de M. Gilbert ANGENAULT : le joindre à ce bulletin et lui adresser dès que possible, et au plus tard le 20 Août I984 , 23 route d'Asnelles-I4II4 VER SUR MER . Tel. (3I) 22 22 86

A                    le
signature

(I) - Rayez la mention inutile

(2) - Il est possible qu'une petite participation financière soit demandée, en fonction du coût du spectacle .

§§ JUNULARA
§§ ESPERANTISTA
§§ FRANCA
§§ ORGANIZO

GERMANA §§
ESPERANTO §§
JUNULARO §§

Invitas al la Kvara Somera

# F R A N C - G E R M A N A S E M A J N O

12 - 19 Aŭgusto 1984 en Le Havre

TEMO : Malŝato inter popoloj
Kio estas popolo ?
Manipulado de la (mal)ŝato
Hereda malamikeco inter la nacioj
Problemoj de enmigrintoj
Ktp ....

CETERE : Vizitoj gvidataj tra la urbo
Tuttaga ekskurso (ĵaŭde)
Teatra prezento de TESPA ( mardon vespere )
Distraj kaj muzikaj programeroj ktp.
Survoje al foriro, Dimanĉon 19an , vizito de Rouen

KOTIZO : tre malalta ; inkluzivas loĝadon, manĝojn, kaj ĉiujn programerojn.
GEJ-anoj kaj JEFO-anoj rericevas 50 % de siaj vojaĝkostoj (maksimume duaklasa fervoja bileto)

| AĜO | ALIĜO ĝis 20/7 | poste |
|---|---|---|
| 14 - 20 | 270 | 300 |
| 20 - 25 | 300 | 330 |
| pli ol 25 | 360 | 390 |

ALIĜO efektiviĝas per pago de 150 FF al JEFO (CCP 31 709 94 Y La Source)
La antaŭpagon minus % vi rericevas se vi malaliĝas antaŭ la 30a de Junio
Bonvolu resendi al JEFO , 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS

---

Nomo (kompleta) . . . . . . . . . . . . . . Aĝo . . .
Adreso . . . . . .
. . . . . . .
Lando . . . . . . .
Mi antaŭpagis al per
Dato subskribo

---

SPECIALA OFERTO por la personoj kiuj povas veni nur unu/du tagojn :
Aliĝo = 10 FF Manĝo = 30 FF Tranokto plus matenmanĝo = 20 FF
Notu ke , por tiu kategorio de partoprenantoj, vi kontaktu :
Catherine DOMINGO Ecole Guy de Maupassant - rue Galliéni
76580 LE TRAIT . Tel. ( 35) 91 71 21